

Heinrich Heine,
Lorelej'

*tradukita de Leopold
Elb*

*Tiu traduko estas po-
ste iom modifita de ali-
uloj, ne estas la origina
traduk-versio de Leopold
Elb.*

Ne scias mi, kial mi
estas
Malgaja en la koro'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia me-
mor'.

Vespero jam ekmalhe-
liĝas,
Fluadas la Rejn' en
trankvil',
La supro de l' monto
lumiĝas
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen
tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kro-
nas
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el
oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

...

Heinrich Heine,
Lorelej

*tradukita de Ludwig
Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subi-
ta
malgaj' en la koro na-
skiĝis;
el tempo jam enterigi-
ta
legendo al mi revi-
viĝis.

Jam malvarmetiĝas l'
aero,
la Rejno mallaŭte ba-
bilas,
per oro de l'sun' en
vespero
la supro de l' monto
rebrilas.

Plej belan knabinon
mi vidas:
en ora ornamo brilan-
te,
sur supro de l' monto
ŝi sidas,
la harojn mistere kom-
bante.

La oran kombilon ŝi
movas
kaj kantas tra l' pura
aero,
kaj forto mirinda sin
trovas
en tiu ĉi kant' de
l'vespero.

...

Heinrich Heine,
Lorelejo

*tradukita de Joachim
Gießner*

Malgajon mi sentas en
koro,
sed kial tia tim' ?
Legendo el pratempa
foro
Vagadas tra mia
anim'.

Jam fluas la Rejn' en
malhelo,
kaj malvarmetas l'
aer'.
Sed brilas la mont' en
orbelo
pro suna lum' de l' ves-
per'.

Jen supre kabino pro-
vokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas
sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, mirige
potenca melodi'.

...

Heinrich Heine,
Lorelay

*tradukita de Hans-
Georg Kaiser*

Min kaptas malgaj' en
la koro,
pro kio tia trist' ?
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun per-
sist'.

Aere fridetas, trankvi-
las,
malhelas jam la Rejn'.
La monto surpinte bri-
las
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,
jen supre por ador';
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora
kombilo
kaj kantas kun pasi';
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi'.

...

<p>Kaj sopiregon eksentas Ŝipisto dum sia vetur’; Rifaron li ne priatentas, Al monto rigardas li nur.</p>	<p>Ŝipet’ iras sur la rivero, ŝipisto ektemis de l’kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kantanto.</p>	<p>Ŝipiston en eta boato Turmentas koremoci’. Ne ĝenas lin rifo-kaskado, rigardas nur supren al ŝi!</p>	<p>Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve’ de ekzalt’. Li ja la rifojn ne vidas’, li vidas nur supren sen halt’.</p>
---	--	---	---

<p>Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat’, Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad’.</p>	<p>Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l’ akvo- turnado; ĝin Lorelej’ faris krue- la, per sia mirinda kanta- do.</p>	<p>Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo la ondoj lin kun boat’. Nun kuŝas li en la pro- fundo pro Loreleja kantad’.</p>	<p>Mi kredas, ke ondoj ti- ras la ŝipon funden de l’ Rejn’; kaj tio de l’ kant’ eliras de Lorelaj-siren’.</p>
---	--	---	---

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazararo Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mu.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kantokolekto “Mia kantaro I”, eldonita de Josef Schiffer (Wilstorffstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo “Fervoja Esperantisto” de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)